

№ 2018:1 (jan-feb)

• Anoncoj

Nomumu kandidatojn por 2018; Esperanto-USA receives grant from ESF; Revuo *Esperanto* elŝutebla senpage; ESF liveras universitatan subtenon; Sale items in the E-USA store; Forpasis George RODENBORN kaj William GOLDSMITH; Alvoko al esperantologia konferenco en Lisbono; New Esperanto-English dictionary online; Korespondi deziras

• LK-2018: Aliĝu nun! / Sign up now!

anoncoj • Jordon KALILICH
Invito al la Landa Kongreso / Invitation to the National Congress

• Lokaj grupoj ricevas helpon

de la prezidanto • Filipo DORCAS
Pro la granda graveco de lokaj grupoj, ni starigis novan postenon en ĉiu regiono, la *regionan helpanton*.

• George BAKER

laŭdoj • Charlotte BURTON
La eterna deziro de multaj esperantistoj estas pli da amuziloj Esperantaj: pli da libroj, pli da muziko, pli da ludoj, pli da filmoj. Pri tiu lasta afero laboras Georgo BAKER.

• De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

• Elpensi rakontojn ĵetkube

ludoj • Hoss FIROOZNIJA
La malmultekostaj ĵetkuboj *Rory's Story Cubes* elskatole konvenas al Esperanto.

• Pano kaj salo, lakto kaj mielo

vojaĝe tra la mondo • Frans VAN DER HORST
Mi havas kontrastoriĉajn memorojn pri mia partopreno en la Esperanto-Karavano 2017 dum la plej longa trajnvojaĝo en la mondo.

• La ŝtelanta klaŭno

enigmo-solvoj
La solvo de nia pasintnumera enigmo.

• Boneco

senintenca esperantaĵo • Steve EICHBLATT
Sed *Best Buy* devus vendi nur plejbonecon, ĉu ne?



Anoncoj

Nomumu kandidatojn por 2018

La Kandidatiga Komitato petas ke membroj de Esperanto-USA, kiu volas kandidatiĝi por la oficoj de Direktoro aŭ Kasisto, anoncu sin al unu el la membroj de la komitato kiel eble plej frue. La komitato devos fini sian rekomendojn kaj sendi tiujn al la Prezidanto de Esperanto-USA antaŭ la 1-a de Marto. La membroj de la komitato estas:



- Brajeno HARMON
- Christopher JOHNSON
- Dominic LAFLAMME
- Julie SCHWARTZ
- Fred MEYER III (estro)

— Fred MEYER, III f3meyer@texoma.net

Forpasis George RODENBORN

George RODENBORN mortis la 2-an de Februaro en Tacoma, Vaŝingtonio, kie lia filino prizorgis lin. Li estis membro de la San-Franciska Esperanta Regiona Organizo (SFERO) dum multaj jaroj.

— Daniel MASON



George RODENBORN.
(Foto danke al lia filino Marcy.)

Forpasis William GOLDSMITH

William (Vilĉjo) GOLDSMITH, antaŭa membro de E-USA, forpasis la 19-an de Novembro 2017 je la aĝo de 80 jaroj. Li estis esperantisto ekde la jaro 1987. Profesie li estis misiisto en Bolivio (kvin jarojn), Porto-Riko (dek tri jarojn) kaj la



William GOLDSMITH

Dominika Respubliko (du jarojn).

En Usono li estis pastoro kaj misiisto en suda Teksaso ĉe la landlimo kun Meksiko (dek ok jarojn), kaj pastoro de hispana preĝejo en Arkansaso (sep jarojn). Post la emeritiĝo, li daŭris en studado de Esperanto kaj havis preskaŭ 200 retroŝtajn amikojn ĉirkaŭ la mondo.

Li kontribuis multajn artikolojn al la eldonaĵo *Dia Regno* dum la lastaj ses jaroj. Kiam li translokiĝis al Olympia, Vaŝingtonio, li membriĝis en la loka Esperanto-grupo kaj multe kontribuis. Lia vidvino diris al mi: “Lia unua pasio estis instrui la Bibliion, sed lia dua pasio estis Esperanto.”

— Ellen EDDY

Esperanto-USA receives grant from ESF

Esperanto-USA has received a \$20,000 grant from the Esperantic Studies Foundation (ESF) for support of leadership training and education.



The funds will be used for training and education initiatives at the local, regional and national levels in the US and for the development of young Esperantists to prepare them for leadership roles. The goal of the grant is to capitalize on the recent interest by the more than one million people who have used the free language learning site Duolingo to learn Esperanto and in many cases are eager to put the language to use in new and practical ways.

“The grant reflects the close ties between the goals of Esperanto-USA and those of the Foundation,” said Philip Dorcas, president of Esperanto-USA. “As the leading organization for Esperanto speakers in the US, we are eager to work with the Foundation to create a new generation of users and students of the international language Esperanto.”

Numero de la revuo *Esperanto* elŝutebla senpage

En la retejo

revuoesperanto.org

<http://revuoesperanto.org>

/revuo_januara> estas senpage elŝutebla la januara numero de la revuo *Esperanto*, la plej renoma periodaĵo en Esperantujo, aperanta jam 111 jarojn. La numero estas la unua en la jarkolekto 2018, la Jaro de Esperanto-Kulturo.



Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne membras en UEA aŭ ne abonas la revuon, estas invitataj konatiĝi kun ĝia riĉa enhavo: novaĵoj, artikoloj, recenzoj, intervjuoj ks.

ESF liveras universitatan subtenon

Signifa donaco de la fonduso

Esperantic Studies

Foundation (ESF) helpis

certigi la estontecon de

studoj pri Esperanto kaj

interlingvistiko ĉe unu el la

ĉefaj nederlandaj

universitatoj. La tuta sumo

de 27 000 USD (21 700 eŭroj), estos uzata por certigi

la estontecon de la katedro pri Esperanto kaj

Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo.

“Por usonaj universitatanoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj rilataj fenomenoj”, komentis Humphrey TONKIN, prezidanto de ESF, “la amsterdama katedro estas brila ekzemplo de tio, kion oni povas atingi en intelekto malferma medio, kie lingvistikaj fenomenoj estas serioze pritraktataj. La fakto, ke Esperanto kaj interlingvistiko estos daŭre reprezentataj en Amsterdamo, helpos plifortigi studojn en tiuj ĉi kampoj ankaŭ aliloke”.

La katedro, nun okupata de profesoro Federico GOBBO de Italujo, havas longan kaj elstaran historion. Esperanto kaj interlingvistiko, kutime instruataj kiel branĉo de lingvistiko, inkluzivas la studon de planlingvoj kaj ilia socia kaj lingvistika kunteksto.



Sale items in the E-USA store

- **DIALOGO INTER SURDULOJ**

Jean CODJO.

Rakonto pri afrikano,


kiu “scipovas la

lingvon de la blanka

homo”. 2007. 52 pĝ.

Mola bindaĵo. Belgujo. Kataloga N^o: DIA006

\$6.00. **Ligilo** <<https://goo.gl/j6hQ2d>>



- **ELEKTITAJ POEMOJ KAJ AFORISMOJ**

Christian MORGENSTERN; Willy NÜESCH (trad.)

Poemoj kaj aforismoj de tre populara germana

aŭtoro. 2006. 205 pĝ. Mola bindaĵo.

Svislando. Kataloga N^o: ELE007. \$18.00.

Ligilo <<https://goo.gl/2MVxf8>>

- **FAKAJ STUDIOJ DE ESPERANTO**

Zdeněk PLUHAŘ (red.)

Pli ol dudek eseoj dividitaj en tri partojn:

Elektronikaj rimedoj, Terminologiaj

problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto,

Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Resumoj en la angla, germana, kaj ĉeĥa

lingvoj. 2003. 146 pĝ. Mola bindaĵo. Ĉeĥujo.

Kataloga N^o: FAK003. \$14.10. **Ligilo**

<<https://goo.gl/A1kCgE>>

- **ILUSTRITA ENCIKLOPEDIO DE HEJMAJ MAMULOJ**

Kompilis Nikolao GUDSKOV.

Priskribas ĉ. 50 speciojn de mamuloj el

diversaj ordoj kaj familioj, kiuj pli-malpli ofte

renkonteblas en hejmoj kiel dorlotbestoj (kaj

ankaŭ ĉ. 50 rasojn de hundoj kaj pli ol 20

rasojn de katoj), iliajn karakterizaĵojn,

kondukon kaj kondiĉojn de hejma tenado.

Temas ankaŭ pri malsanoj de la bestoj, zoothigieno, bredado ks. Priskribon de la bestoj akompanas nigrablankaj ilustraĵoj. Esperantaj nomoj de la bestoj estas provizitaj de la angla, germana, franca, rusa, kaj scienca (latina) tradukoj; en la fino estas indeksoj en tiuj lingvoj kaj tabelo kun certaj biologiaj karakterizaĵoj de la priskribitaj bestoj. 2008. 240 pĝ. Mola bindaĵo. Ruslando. Kataloga N^o: ILU005. \$20.00. **Ligilo** <<https://goo.gl>>

/HXoJoi>

- **GRANDA MEAULNES, LA**

Alain FOURNIER; tradukis Roger BERNARD.
Romano pri “la verda paradizo de amoj
knabnaivaj”; unu el la plej famaj francaj
romanoj. 1976. 222 pĝ. Mola bindaĵo.
Hispanujo. Kataloga N^o: GRA004. \$8.00.

Ligilo <<https://goo.gl/PhbG4R>>

Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito
CA 94530, aŭ rete.

Alvoko al Esperantologia Konferenco en Lisbono

La organizantoj de la
Esperantologia Konferenco
2018 okazonta en Lisbono,
Portugalujo, kadre de la
103-a Universala Kongreso
de Esperanto, alvokas ĉiujn
fakulojn, sciencistojn kaj
aliajn kongresanojn al
partopreno.



La aranĝo havas kiel specialan temon la vivon kaj
verkaron de Detlev BLANKE (1941-2016), unu el la
fondintoj de la tradicio de esperantologiaj
konferencoj kaj elstara aganto por la evoluigo de
esperantologio dum la lastaj kvardek jaroj.

La konferenco okazos en du partoj: dum la matena
sesio oni planas aŭskulti prelegojn de fakuloj
kunlaborintaj kun Detlev Blanke, aŭ dezirantaj omaĝi
al lia memoro. Ili elstarigos la diversajn kontribuojn
de Detlev al lingvoscienco kaj al Esperanto kaj lian
eksterordinaran eldonan kaj verkan agadon.


En la dua duono la partoprenantoj denove havos
ŝancon prezenti sian laboron pri diversaj kampoj de
esperantologio. La kontribuoj estos prezentitaj ĉu en
afiŝoj ĉu per normalaj mallongaj referaĵoj. La
organizantoj invitas ĉiujn fakulojn, aparte gejunulojn
kaj unufojajn partoprenantojn, sendi afiŝproponojn
aŭ proponojn pri referaĵoj kiel eble plej baldaŭ al
ek@kulturo.net. La limdato por la proponoj estos

2018-04-30.

New English-Esperanto dictionary available online

I have constructed an
annotated English-
Esperanto dictionary **which
is available online**

<<http://www.esperanto-me.org/dic/>>.



This is a compilation of
entries from the dictionaries of Benson, Wells, ReVo
and several other sources.

You are welcome to use the dictionary for free, but
please report errors or omissions to me at:
wb_harris@hotmail.com.

— Vilĉjo HARRIS wb_harris@hotmail.com

Korespondi deziras

Mi nomiĝas Dominique
BARON kaj loĝas en Tours,
Francujo. Mi instruas
Esperanton en la Instituto
Notre-Dame La Riche al
kvar junaj knaboj. Tri havas
11 jarojn kaj unu havas 13
jarojn. Ili estas komencantoj.
Por ke ili sciu, ke Esperanto
estas vere internacia, mi
petas vin, se vi bonvolas,
sendi al ili poŝtkarton de via
lando. Tiamaniere, ankaŭ la tuta Instituto scios pri
Esperanto.



Institution Notre Dame La Riche
à l'attention de Dominique BARON
30 rue Delpérier
B.P. 5813
37058 Tours Cedex 1
France

LK-2018: Aliĝu nun! / Sign up now!

anoncoj • Jordon KALILICH



Kuniĝu kun Esperanto-USA kaj Kanada Esperanto-Asocio ĉi-somere dum ni festas la lingvon internacian. Nia komuna Landa Kongreso okazos ĉe *Seattle Pacific University* (Seatla Pacifika Universitato) en Seatlo, Vaŝingtonio, de vespere vendredon, 13-an de Julio, ĝis tagmeze lundon, 16-an de Julio. Okazos programeroj por spertaj kaj komencantaj esperantistoj; inter ili estos kaj prezentaĵoj kaj interaĝaĵoj.

Ni ĝojas anonci, ke Chuck SMITH faros ĉefprelegon pri la kongresa temo, *Konstruado kaj ĝuado de Esperanta komunumo*. Kiel la kunkreinto de la Esperanta kurso de Duolingo kaj la saĝtelefona aplikaĵo Amikumu, Chuck nun estas inter la plej konataj homoj en Esperantujo. En tiuj kaj aliaj entreprenoj, li enkorpiĝis la spiriton de la internacia lingvo, uzante ĝin por kunigi homojn. Prelegos ankaŭ D-ro Federico GOBBO, profesoro de la katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, Nederlando.

Kio pri la pluvo? Somere, Seatlo ĝuas veteron mildan kaj sunplenan; la pasintan Julion, oni registris neniom da pluvo. Ni planas profiti tion per ekskursoj dum la kongreso kaj per postkongresa tendumado en *Mount Rainier National Park* (Nacia Parko Monto Rajnero), 16-19 Julio.

Dum la venontaj monatoj ni provizos pliajn detalojn pri la programo – inkluzive de pliaj gastoj anoncotaj – en **la kongresa retpaĝaro**

<<https://landakongreso.org>>. Tie vi povas ankaŭ vidi liston de aliĝintoj kaj trovi ligilon al nia Fejsbuka okazaĵo.

Ĉu vi volas kontribui? Ni serĉas prelegontojn,

muzikistojn, gvidontojn de programeroj, kaj aliajn volontulojn. Sendu retmesaĝon al seatlo2018@esperanto-usa.org se vi interesiĝas.

Jam eblas **aliĝi per la retbutiko de E-USA**

<<https://retbutiko.esperanto-usa.org>>. Ne prokrastu: la kotizoj pliiĝos la 1-an de Aprilo!



Join Esperanto-USA and the Canadian Esperanto Association this summer as we celebrate the international language. Our combined National Congress will be held at Seattle Pacific University in Seattle, Washington, from the evening of Friday, July 13, until midday Monday, July 16. The program will have sessions for both experienced and novice speakers, and will include both presentations and hands-on activities.

We're excited to announce that Chuck Smith will be giving a keynote speech about the congress theme, *Building and Enjoying an Esperanto Community*. As the co-creator of Duolingo's Esperanto course and the app Amikumu, Chuck is one of the best-known figures in the world of Esperanto today. In these and other endeavors, he's embodied the spirit of the international language by using it to bring people together. There will also be a talk by Dr. Federico Gobbo, professor of Interlinguistics and Esperanto at the University of Amsterdam, Netherlands.

What about the rain? In the summer, Seattle enjoys sunny and mild weather; last July, no rain was recorded. We plan to take the most of it with excursions during the congress and a post-congress camping trip in Mount Rainier National Park, July 16-19.

In the coming months we'll provide more details about the whole program – including more guests to be announced – on **the congress website**

<<https://landakongreso.org>>. There you can also see who's already signed up and find a link to our Facebook event.

Want to contribute? We're looking for speakers, musicians, activity leaders, and other volunteers. If you're interested, send an email to seatlo2018@esperanto-usa.org.

George BAKER

laŭdoj • Charlotte BURTON

En tiu ĉi rubriko ni intervjuas aŭ alimaniere prezentas niajn membrojn por reliefigi ties aktivecon kaj sukcesojn en Esperantujo.



Du el la filmoj tradukitaj en Esperanton: *Domo de fantomoj* kaj *Atako de la lunaj zombioj*.

La eterna deziro de multaj esperantistoj estas pli da amuziloj Esperantaj: pli da libroj, pli da muziko, pli da ludoj, pli da filmoj. Pri tiu lasta afero laboras Georgo BAKER, kiu kunordigas tradukojn de la **filmoj de Christopher MIHM** <<http://www.sainteuphoria.com/>>. Ne kontenta pri la malmultaj Esperanto-lingvaj filmoj, kiuj ekzistis, Georgo kaj kelkaj aliaj komencis kunlabori kun la sendependa filmisto, por solvi la problemon.

Georgo diras, “Mihm kreas ĉiun jaron unu aŭ du filmojn de retrostila ĝenro, kvazaŭ faritajn en la 1950-a jardeko. Li estas profesie son-inĝeniero, kaj liaj kolegoj estas simile profesiuloj en la diversaj fakoj de film-produktado. Oni volontulas sian tempon al ĉiu filmo. Mihm verkas la scenaron. La filmoj estas bonkvalitaj, kaj malmultkostaj. La teknikajoj estas ĉarme krudaj, kiel en malnovaj filmoj. La filmoj estas kreitaj en domoj, keloj, kaj parkoj en la regiono de Mineapolo, kaj oni aktoras en la angla.”

Post verkado de la scenaroj, Mihm sendas ilin al niaj

Registration is now open in the **online store of E-USA** <<https://retbutiko.esperanto-usa.org>>. Don't delay: rates increase April 1!



George BAKER

karaj esperantistoj, kiuj tradukas kaj voĉaktoras la scenaron, kaj resendas al Mihm, kiu redaktas por uzo kiel apartan, Esperantan sontrakon. Iliaj kunlaborantoj estas multaj, kaj el diversaj lokoj. Kelkaj el ili laboras kune por traduki, kontroli la tradukon, kaj redakti. Ili voĉregistras ĉiun frazon kelkfoje, por ke Mihm povu elekti la plej ĝustan por la sceno. Dekoj da volontuloj helpas ĉiujare pri la esperantigo de tiuj filmoj, aŭ per traduko, aŭ per redakto, aŭ per voĉaktorado, ktp.

Pro la forta laboro de Georgo kaj liaj kunlaborantoj, la nombro de tut-longaj Esperanto-lingvaj filmoj pli ol duobliĝis dum malpli ol dek jaroj, kaj ili ankoraŭ laboras kaj tradukas kaj donas al ni multajn horojn da amuziĝo. Dankon al Georgo pro lia kunordigo de tiu laboro, kaj dankon al la multaj homoj, kiuj laboras kun li por efektiviĝi la tradukitajn filmojn.

Lokaj grupoj ricevas helpon

de la prezidanto • Filipino DORCAS

Pro la granda graveco de lokaj grupoj, ni starigis novan postenon en ĉiu regiono, la *regionan helpanton*. Tio estas nova entrepreno, nova iniciato. Ĝi ne vere estas kampanjo, ĉar kampanjoj ofte havas komencon kaj finon. Nia nova posteno en ĉiu regiono estos daŭra helpo.

Multaj lokaj grupoj alfrontas defiojn, kaj ni rajtas ne “reinventi la radon” en ĉiu loka grupo. Ni fortigas nian komunikan infrastrukturon por ebligi komunikadon inter lokaj grupoj, inter grupoj kaj ties helpantoj, kaj inter grupoj kaj Esperanto-USA.

Vidu en nia retpaĝaro la paĝon de via propra regiono, kie vi trovos kontaktinformon por la koncernaj helpantoj.

Kian helpon?

Kiel regiona helpanto povas helpi vin? Kian helpon vi bezonas? Kio estas la ĉefaj defioj de via loka grupo? La gvidantoj de Esperanto-USA ne povas decidi tion por vi, ĉar ĉiu grupo estas unika. Plie, ĉiu grupo havas siajn proprajn celojn. Vi kun aliaj membroj de via grupo decidu, kio estas viaj defioj, bezonoj, celoj, kaj agadoj.

Viajn ĉefajn demandojn aŭ defiojn

Plej ofte, la plej grava tasko por plibonigi lokan grupon estas eltrovi la ĉefan demandon de la membroj. Trovi la demandon povas esti pli grava ol akiri ties respondon. Sed kio? Elektu el nia grupo viajn demandojn, aŭ verku vian propran.


1. Ĉu via grupo diskutas viajn komunajn celojn aŭ projektojn?
2. Ĉu via kontakta informo ĝustas en nia retpaĝo?
3. Ĉu vi havas kontaktinformojn de Esperanto-lernantoj en Duolingo, Lernu! aŭ aliaj kursoj?
4. Ĉu vi publike anoncas lokajn kunvenojn? (Kiel? Ĉu interrete? Ĉu ĵurnale?)

5. Kiujn raportistojn de via loka ĵurnalo aŭ televidstacio emas raporti pri temoj rilate al lingvoj aŭ homaj rajtoj? Ĉu vi sendas anoncojn aŭ artikoletojn al ili? Ĉu vi jam havas kontakton kun loka ĵurnalistoj?
6. Ĉu via biblioteko aŭ komunuma centro provizas kunvenejon aŭ renkontiĝejon por grupoj kiuj servas al la publiko?
7. Ĉu iuj membroj de via loka grupo havas familiajn membrojn en publikaj lernejoj? Se jes, ĉu estas ebleco komenci Esperanto-klubon en la lernejo?
8. Ĉu vi kontaktis iujn lingvajn instruistojn? Kial? Kial ne?
9. Ĉu ekzistas iuj membroj de via loka grupo, kiuj ankaŭ estas membroj de aliaj interesaj grupoj? (*Kiwanis*, *Lions Club*, *Masons*, Skoltoj, religiaj organizaĵoj, *Mensa*, ŝakludo, amatora radio, ktp.) Se jes, ĉu ili serĉas temojn por programo? Kaj ĉu iliaj bultenoj akceptas artikolojn aŭ anoncojn pri diverseco aŭ interkulturaj programoj?
10. Ĉu ekzistas internaciaj foiroj, ekspozicioj aŭ interkulturaj tagoj en la komunumo aŭ la lernejoj?
11. Ĉu via klubo havas ajnajn disdonaĵojn aŭ propagandajn materialojn? Ĉu broŝurojn, afiŝojn, aŭ komercajn kartojn?
12. Ĉu ekzistas ebleco prezenti al la publiko en via biblioteko aŭ komunuma centro?
13. Ĉu via klubo havas regulajn programojn?
14. Kion via klubo faras por komencantoj kaj novaj membroj?
15. Kion faras la membroj de via loka grupo por interesi homojn pri Esperanto? Rimarku, ke personaj rakontoj estas la plej efikaj, perante emocijon al aliaj.

16. Ĉu membroj de via grupo volas regulajn kursojn? Kiel povas la klubo helpi membrojn progresi en siaj lingvaj kapabloj?
17. Ĉu vi demandis en viaj lokaj librejoj kaj bibliotekoj, ĉu ili havas Esperantajn librojn? Helpas demandi, eĉ se ekzistas aliro al reta katalogo.
18. Kio estas viaj ideoj por helpi aliajn lokajn grupojn?
19. Ĉu vi uzas la apon Amikumu aŭ alian ilon por trovi lokajn studentojn, kiuj ne konas vian klubon?
20. Kiajn ilojn la membroj de via loka grupo uzas por interkomunikiĝi?

Via loka grupo nepre diskutu ĉi tiajn temojn, malkovru viajn celojn, kaj kreu planojn. Kompreneble, komunikiĝu kun viaj regionaj helpantoj! Ili volas helpi vin. Kiam mi verkas ĉi tiun artikolon en la mezo de Februaro, ni jam havas volontulojn por naŭ el la dek regionoj. Eble ni havos helpon por ĉiu regiono kiam vi legas ĉi tion.

Ek kaj antaŭen!



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

Boneco

senintenca esperantaĵo • Steve EICHBLATT



Membro Steve EICHBLATT atentigis nin pri tiu aerpurigilo, kiun li trovis en *Best Buy*. Ŝajne la vendejo de la “plej bona aĉeto” vendas ne plejbonecon, sed nur ordinaran bonecon.

Pano kaj salo, lakto kaj mielo

Esperanto-Karavano 2017

vojaĝe tra la mondo • Frans VAN DER HORST

Membro Frans VAN DER HORST verkis la raporton pri sia partopreno en Esperanto-Karavano, longa trajnvojaĝo tra Rusujo. Ni adaptis elangligon de Andreo OBREZKOV por la jena artikolo. Se vi volas legi pli pri la karavano, kaj eble partopreni en ĝi, vizitu la **retpaĝaron de Esperanto-Karavano** <<http://esperanto-karavano.info>>.



(Foto danke al esperanto-karavano.info)

Mi havas kontrastoriĉajn memorojn pri mia partopreno en la Esperanto-Karavano 2017 dum la plej longa trajnvojaĝo en la mondo, kiu okazis en Rusujo. La kontrastoj iĝis evidentaj jam en la komenco de mia vojaĝo, kiam mi la 4-an de Julio 2017 alteriĝis ĉe flughaveno en Sankt-Peterburgo kaj paŝis tra senhomaj koridoroj kun enigmaj cirilsignaj mesaĝoj sur la muroj, kaj mi konstatis ke mi tutcerte venas en tute malsaman mondon, kiun mi ne komprenas. Mi sentis min nervostreĉita kaj forlasita, sed en la enireja koridoro mi rimarkis malgrandan verdan Esperanto-flagon. Tiam mi ekvidis, ke jen finfine mi trovas sekurecon. Tatjana, la ĉeforganizanto, kaj ŝia filino Maja renkontis min kiel delonge konatan amikon, en lingvo kiun mi povis kompreni.

La vojaĝo, kiu daŭris sep tagojn kaj noktojn en trajno por veturi 9288 kilometrojn de Moskvo ĝis Vladivostoko, revenvoje forprenis malpli ol naŭ horojn en la komforto de Airbus-aviadilo. Inter tiuj ekstremaj punktoj estis 18 tagoj de kontrasto-plenaj eventoj, kiuj estis por mi ege valoraj kaj kiujn mi

volas memori laŭeble plej longe. Ekzemple, demeto de niaj strataj ŝuoj kiam ni eniris ies hejmon, kaj surmeto de pantofloj (kiujn oni provizis al ni en la trajno kaj aviadilo); sed kontraste, en trajnoj ni neniam rajtis meti uzitan necesejan paperon (jes, mi diris *neniam* kaj *uzitan*) en necesejan seĝon, ĉar tio povus ŝtopi ĝin. (Ni devis uzi specialan rubujon.)

Memorante vortojn de la usona eks-prezidento Ronald REAGAN, ke Rusujo estas “la imperio de malbono”, mi iom timis homojn en uniformoj. Sed severaspekta doganisto en la flughaveno, post atentega kontrolo de mia pasporto, ridetis kiam mi diris *spaciba* (“dankon”) kaj *dosvidanja* (“ĝis revido”).

Buntaj cepoformaj domoj de la Katedralo de la Ĉefanĝelo Mikaelo, en la moskva Kremlo, forte kontrastis kun la ladaj tegmentoj de vilaĝaj domoj, kiujn mi vidis ĉie en kamparo. Altaj nubskrapuloj en Moskvo aspektis tre futurisme, sed kadukaj unuetaĝaj domoj aspektis kvazaŭ ili povus disfali en ajna momento.

Estis tre intensa vojtrafiko, kaj ŝajnis, ke neniuj obeis rapidecajn limojn. Estis multege da homoj en grandaj urboj, sed mi vidis neniun senhejmulon kaj neniun rabon, kaj ankaŭ tre malmulte da grafitio.

Mi ege ĝuis la ĉirkaŭantan silenton, kiam ni leviĝis per funikularo sur la monto Sobolinaja (“zibela”) kun piedoj pendantaj en aero kaj rigardante sube homojn, kiuj kolektis fungojn de arbaraj deklivoj. Atinginte la montopinton ni rigardis de birdfluga alteco ĉirkaŭajn montojn kaj la lagon Bajkalo, la plej grandan lagon en la mondo, same grandan kiel Belgujo. Sed dum nia lasta vespero en Vladivostoko, promenante laŭ la Amura golfo, mi ĝuis ankaŭ muzikon kaj infanajn ridojn, dancadon kaj manfrapadon fare de grupo de orientazianoj, striojn de multkoloraj akvofontanoj, kaj feliĉajn ĝemojn de viroj, kiuj montris siajn muskolojn turnante sin sur paralelaj rekoj.

En Kremlo ni vidis paradon militan, kie oficiroj

sidantaj sur ĉevaloj ordonis al pli ol cent soldatoj en belegaj uniformoj montri sian lertecon en marŝado, ekzercoj kun pafiloj, kaj pafado. Tio estis brilega spektaklo, se nur pro la orkestrestro, kiu kondukis tiel entuziasme, kaj la belaj, brile trejnitaĵoj. Sed la tuta spektaklo forte kontrastis kun profundega silento kaj mistera beleco en la Asumpcia Katedralo, kie antikvaj sanktuloj rigardis al ni kvazaŭ invitante nin aliĝi al ili en la postvivo.

En Rusujo mi spertis tute malsame eĉ tempon kaj spacon. Sekundojn oni kutime konsideras tre mallongajn tempoperiodojn. Horoj daŭras multe pli longe. Spaco, laŭ mi, estas simila al malfermitaj vastajoj de la Centra Okcidento en Usono. Tamen sekundoj en Rusujo povas daŭri horojn, ŝajne, precipe kiam oni devas atendi (erare) en vico. Kaj atendo estas sufiĉe ofta evento en Rusujo. Sed horoj povas pasi ankaŭ momente, jes, eĉ veturante kvar tagojn kaj noktojn en trajno de Moskvo ĝis Irkutsko. Kaj la spaco en Rusujo estas eĉ pli vasta ol la Centra Okcidento en Usono. Ĝi ŝajne ne havas limojn; la ĉielo pendas kvazaŭ volbo, kaj tie oni komencas senti sin tre malgranda kaj ne havanta signifon sur la Tero.

En ĉiuj urboj mi vidis renovigojn de tre malnovaj konstruaĵoj kaj preĝejoj, kvazaŭ la pasinteco devas esti memorata, konservata kaj riparata. Ekzemple, la Triumfa Nikolaa Arko en Vladivostoko, kiun oni konstruis en 1891 por honori la viziton de la caro, estis detruita en 1930 pro tio, ke ĝi reprezentis la malnovan ordon. Sed en 2003 oni restaŭris ĝin al ĝia malnova gloro.

Tridek kilometrojn ekster Sankt-Peterburgo estas la pompo de Peterhofo, la somera palaco kiun konstruigis caro Petro la Granda. Li feris tie ĉar somere la kanaloj en Sankt-Peterburgo estis tro fiodoraj. En Sankt-Peterburgo estas ankaŭ la Vintra Palaco, el kiu Katerina la Granda poste faris la tutmonde faman muzeon *Ermitaĵ* (“Ermitejo”). Mi

komprenis kial Lenin en 1917 komencis la revolucion, kiun startigis kanonpafo de militŝipo *Aurora* en la Sankt-Peterburga haveno, kaj kiu ŝanĝis por ĉiam la antaŭe mizeran sorton de milionoj da kamparanoj en tiu grandega lando.

Mi bone memoras la gastamon de la plejmulto de rusujanoj, kiujn mi renkontis; kelkaj el ili dividis kun ni siajn manĝojn kaj montris familiajn fotojn, eĉ kiam ni ne povis kompreni unu la alian. Kaj oni jam delonge forgesis la malbonajn rilatojn de la sovetia tempo.

Sed la plej gravan konstaton mi ekhavis kiam, reveninte al Usono, mi skribis miajn pensojn pri tiu vojaĝo. Ĝin kaŭzis ne la grandeco de la mirindaj vidindaĵoj de Vladivostoko, ne la sonorila sono de multnombraj preĝejoj aŭ danca koncerto en Moskvo, ne la entuziasme gastamaj popolmuziko kaj fruktaj kukoj en la fortikaĵo de Petro-Paŭlo, ne la metroaj veturoj en grandaj urboj kaj busvojaĝoj en la kamparo, ne la vizito al budhana templo kaj riskoplana grimpo al la akvofaloj en Arŝan, eĉ ne la kortuŝa ortodoksa preĝeja servo en la katedralo de Sankta Nikolao, en kiu ikonoj ŝajne invitis nin eniri iliajn framojn.

Ne, mi konstatis ke tiu vojaĝo tra la “imperio de malbono” plene kontrastis kun tio, kion mi unue supozis. Mi konstatis, ke la amo de la vojaĝ-organizantoj por sia lando baziĝis je longa, riĉa historio. Ilia preteco dividi bonon kaj malbonon, belecon kaj malbelecon kun eksterlandanoj estas reala. Ili donis al mi ne nur bezonojn de la vivo – la tradiciajn donacojn de “pano kaj salo” – sed danke al la riĉaj kaj diversaj kulturoj, mi ricevis ankaŭ la bibliajn simbolojn de boneco kaj abundo – “lakto kaj mielo”.

Jes, Rusujo donis al mi sian panon kaj salon, sian lakton kaj mielon, sed mi lasis parton de mia animo tie. Kaj pro tio mi estas profunde dankema.

Elpensi rakontojn ĵetkube

ludoj • HOSS FIROOZNA



Rory's Story Cubes

Ekzistas pluraj ludoj, en kiuj oni kreas rakontojn surbaze de hazarde elektitaj bildoj. Furora ekzemplo estas la anglalingva kartludo *Once upon a time*: sur ĉiu karto aperas ilustrita vorto rilate al fableca temo, ekz. princino, sorĉado, ringo, ks. Ludantoj provas elpensi fabelon uzante la manplenon da kartoj, kiujn ili ricevas.

Ne mallonge post populariĝo de la anglalingva originalo, esperantistoj tradukis ĝian regularon. La rezulto, *Iam estis...* nun havas propran **paĝon en la Esperanto-Vikipedio** <https://eo.wikipedia.org/wiki/Iam_estis...>. Tamen ankoraŭ restas granda defio por ludantoj: manko de esperantigitaj kartoj. La plej diligentaj ludemuloj tradukas kaj presas siajn proprajn kartojn, sed kompreneble tia solvo ne konvenas por ĉiuj.

Simila – sed pli simpla – ludo estas *Rory's Story Cubes*. Ĝia ekipaĵo estas elegante minimuma: entute nur naŭ ĵetkuboj, nete nestitaj en portebla ujeto. Sur la flankoj de ĉiu kubo aperas po unu abstrakta bildo (piktogramo), ekz. de okulo, seruro, horloĝo, demandosigno, ktp. Aperas nur bildoj, sen vortoj; do la ludo jam bone konvenas al Esperanto, elskatole!

La simpleco de la bildoj povas instigi kreemon, ĉar kutime eblas elpensi por ili plurajn signifojn. Ekzemple, abstrakta bildo de pomo povus signifi ne

nur la frukton mem, sed ankaŭ manĝaĵon pli ĝenerale. Aŭ komputilon. Aŭ ion malpermesitan. Aŭ Novjorkon (la “Granda Pomo”), aŭ eĉ graviton (pensu pri la legendo pri Isaac NEWTON)... kaj tiel plu.

La regularo estas same simpla kaj fleksebla. La kreintoj donas tri skizajn proponojn, konsilante ke oni adaptu ilin laŭplaĉe:

1. Laŭvice, ĉiu ludanto ĵetas naŭ kubojn kaj provas elpensi rakonton kiu kunligas la supre montratajn bildojn.
2. Iom pli defie: laŭvica ludado kiel en (1), sed antaŭ ĵetado oni devas elekti temon/titolon por la rakonto, ekz. “Mia bela sonĝo” aŭ “Mia freneza vojaĝo”.
3. Kunrakonta ludo: unu ludanto prenas kubon el la ujo, ĵetas ĝin, kaj komencas rakonton per la supre montrata bildo. Tiam laŭvice, en rondo, ludantoj prenas kaj ĵetas po unu kubon kaj provas daŭrigi la rakonton. La ludo finiĝas kiam la kubo elĉerpiĝas.

Sendube oni povus krei kartaron kun 54 piktogramoj sen multe da laboro, do ne vere *necesas* aĉeti ĵetkubojn. Tamen la kubo estas aparte ĉarmaj, kun tre plaĉa – kaj tuŝinda – aspekto; ili kvazaŭ invitas onin al ĵetado kaj ludado. Kaj, almenaŭ je la eldonto de tiu ĉi artikolo, ili malmulte kostas: **nur \$8 ĉe Amazon** <<https://amazon.com/dp/B003EIK136/>>.



Hoss FIROOZNA

Hoss loĝas en frosta Roĉestro, Novjorkio, kie dumtage li laboras kiel ordinara komputilisto. Nokte, tamen, li surmetas sian redaktor-kostumon...

hoss@lodestone.org

La ŝtelanta klaŭno

enigmo-solvoj



En nia lasta enigmo, *La ŝtelanta klaŭno*, okazis mistera ŝtelo ĉe cirko. Iu eniris la ruldomon de trapezisto Pandoro, batis ŝin sur la kapon de malantaŭe, kaj ŝtelis ŝian monon. Barbara la

barbulino akuzis Ridigon la klaŭno. Sed Ridigo deklaris sin senkulpa. Kiun kredi?

Prof. Ŝibolet rimarkis, ke la batilo estas metala kuirpoto. Kaj Ridigo estis vestita en komika kavalir-kostumo farita el potoj. Tamen Ŝibolet akuzis ne Ridigon, sed Barbaran! Kial?

Ĉi-foje, ĉiuj niaj detektivoj sukcese divenis la solvon. Jen unu klarigo, danke al detektivo Jorge Rafael (“Rafa”) NOGUERAS:

Ŝibolet sciis, ke la klaŭno ne kulpis, pro tio ke li estis ankoraŭ vestita en sia bruega kavalira kostumo el metalaj potoj kaj patoj: certe, se li estus ŝtelirinta en la ruldomon de Pandoro, [...] Ŝi estus aŭdinta la tintegadon kaj klakegadon de la kostumo. Pli verŝajne Barbara frapis Pandoron per metala kuirpoto kaj provis kulpigi Ridigon.

Ĝuste. Ankaŭ sukcesis Ellen EDDY, Abraham PALMER kaj John THOMAS. Gratulon al ĉiuj! En la ĉi-numera lotumado gajnas Abraham kaj John, kiuj ricevos po unu premion: \$5-rabaton de la retbutiko de E-USA.

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere sendu materialojn retroŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Se vi sendas materialojn poŝte, ni resendos ilin al vi se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>>. Cetero ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuantoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, your address, and a head shot. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. If you send materials by mail, we will return them to you if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike license BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we additionally ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.